# Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)



Juan Gracia, Konsilando de la 1-a Vaska Aùtonoma Registaro.

N-ro 26 APRILO-MAJO-JUNIO 1995

Kajeroj — el la Sudo

Fondita en 1988.

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: Martín Bustin Benito
Apartado de Correos n-ro 4143.
ES-03080 ALICANTE (Hispanio)

---

Sekretario: Jesus de las Heras Giménez
Av. Juan Carlos I, 24.-2/G. Edificio Nueva Ronda, 1.
Es-30008 MURCIA (Hispanio)

---

Provizora Kasisto: Martín Bustin Benito
Apdo. de Correos n-ro 4143. ES-ALICANTE (Hisp.)
Monsendoj de kotizoj kaj abonoj, ankaŭ el eksterlando per Poŝta Kaso al la Libreta n-ro 37-02.614.635.(Ofic. 1302-0482,9). 03012-ALICANTE. Sen aldona sendokosto en Hispanio.

---

Redaktoroj de la bulteno:
Antonio Marco Botella
Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9º.C;%0002-ZARAGOZA. Hispanio.
*****
Miguel Fernández Martín
C/ Santa Genoveva, 58. 6º/C. 28017-MADRID (Hispanio)

---

Kovrilo: Juan Gracia, konsilanto de la 1-a Vaska Aŭtonoma Registaro kaj aktiva esperantisto.(Historio Laborista E-Movado).

Enhavo:

La reflugo de niaj LEA-oj . . . . . . . . . 3/4/5 pĝ.
Kaŭzoj de la hispana intercivitana milito 6/7/8 "
Iam, antaŭ nelonge okazis . . . . . . . . 9 "
Bonvolu ridi...sed ne tro! . . . . . . . .10/11/12 "
Kio okazas en la mondo . . . . . . . . 13/14 "
La Movado en kaj ekster Iberio . . . . . 15/16 "
Garcia Lorca kaj lia domo ĉe la bedaro. . 17 "
Alvoko al niaj veteranoj . . . . . . . . . 18/19 "
Enigmoludo pri beletraj bestoj . . . . . 20/21 "
Originala Poezio . . . . . . . . . . . . 23 "

---

Noto:Pri la enhavo de la artikoloj respondecas l'aŭtoroj mem.



# LA REFLUGO DE NIAJ LEA-oj

Ni volas pensi, ke ĉiu konscia SAT-ano, de antaŭ kelkaj jaroj, sentas profundan maltrankvilon pro la disvolvo neoptimisma de nia Laborista Esperanto-Movado en la mondo. Gravas, ke ni agnosku la aŭtentan realon en kiu statas niaj LEA-oj, kiuj ne nur ne progresas, sed tre ofte la agado de la plej aktivaj apenaŭ preterpasas la limojn de modesta viglo ene de la marko de lokaj Grupoj. Kompreneble, kun la atentinda escepto de SAT-Amikaro, laste atinginta kontentigan stabilon.

Tiu bedaŭrinda agnosko tute ne kaŝas kritikon al iu ajn gvidanto de niaj duonparalizitaj LEA-oj aŭ al la neambicia politiko neekspansiema de la SAT-P.K., nia celo antaŭ tia konstato tute simple pretendas rompi tiun politikan marasmon, instigi niajn plej fervorajn kamaradojn batali kontraŭ certa indiferento invadanta niajn mediojn, niajn sindikatojn, multajn el ni; kaj ĝenerale ni celas reveni al etoso idealisma de aliaj tagoj, kuraĝigi niajn kompanojn meti finan punkton al tiu ĉi jam longa etapo plena de pasivaj sintenoj kaj senentuziasmaj projektoj kaj agado...

La problemo ampleksas ne nur la laboristojn esperantistajn, sed ĝenerale la tutan laboristan movadon, envolvitan en certa erozia rutino, kiu bremsas niajn impulsojn, kvankam ni hodiaŭ konkretigas nian komentarion, nian pripensadon, nur al la Laborismo Esperantista. Lenin, saĝa politikulo el pasinto, en unu el tiuj periodoj de idealismaj svenoj en la propraj vicoj, diris al siaj partianoj: "kiam oni ne progresas en nia politika celo kaj ekzistas certa konfuzo paraliziga en niaj vicoj, nepre oni devas rekomenci,

reveni al la principoj, redifini niajn celojn"... Eble ni, laboristoj esperantistaj, vivas unu el tiuj periodoj, kaj jam venis la momento skui niajn hezitojn, repensi pri niaj principoj, pretigi novan strategion, unuvorte rekomenci... Kiu estas la sekvenda vojo? En HALE, envolvita nun en profunda krizo, ni devas rekomenci per organizado de nia estraro, starigo de nia propra Libro-Servo, reĝustigo de niaj kotizoj, solidara kunlaborado inter laboristaj bultenoj, planado de kursoj en sindikatoj kaj aliaj centroj, intensigo de niaj rilatoj kun la diversaj nun funkciantaj LEA-oj, fari nian eblon kongresi ktp. Kion ni bezonas por ekfunkciigi tiujn servojn? Tute simple, ke niaj HALE-membroj volonte informu la nunan provizoran estraron pri sia preteco deĵori en unu el tiuj postenoj nun vakantaj. Kiam ni ekscios pri la nombro de tiuj volontuloj, ni planos la komunan taskon.

De la unua momento, kiam ni albordis la problemon pri la stagnado de nia Laborista Movado, ni konsideris prioritata la taskon pri revivigo de niaj LEA-oj, starigo de reto de SAT-asocioj kreante ilin kie ankoraŭ ne ekzistas, ambicia planado de komunaj propagando, eldonado kaj instruado; redifino de ideologiaj principoj pli koheraj kun nia epoko, kaj resume strukturi internacian laboristan movadon, kaj sen plu atendi meti jam la unuajn ŝtupojn por ke tiun kvazaŭ utopian programon oni rigardu sub aspekto pli realisma kaj plenumebla:

Jam en la pragmata kampo de realaj faktoj kaj ne plu per ĵonglado de ideoj, ni sendis nian revuon al pluraj LEA-oj, kaj kelkaj el ili respondis sendante la siajn: "SAT-Amikaro", "Liberecana Ligilo", "Laŭte", "SLEA-Informilo", k.a. Tio jam signifas paŝon antaŭen, ĉar antaŭ nelonge ni, de tempo al tempo, sendis nian revuon al kelkaj LEA-oj, kaj nur densa silento venis kiel sola respondo. Ni petas tiujn laboristajn asociojn aŭ Grupojn, kiuj ankoraŭ ne ricevis nian gazeton, komuniki tion al ni, kaj plezure ankaŭ al ili ni sendos ĝin.

Kompreneble, ke ni akceptas la proponon de unu el tiuj asocioj pri reprodukto de iu ajn el niaj plej interesaj artikoloj en ne gravas kiu el la gazetoj de nia SAT-familio. Mi aldonas ion kroman, "Sennaciulo" mem devus reprodukti la plej gravajn artikolojn de niaj revuoj, kiam iu ajn el ili estas sufiĉe interesa por meriti tion. La problemo de "Sennaciulo" estas sufiĉe grava, ĉar ĝi funkcias sen ĉefredaktoro. Kaj mi diras tion, ne kiel kritikon al la nuna ĉefredaktoro, sed tute kontraŭe, de la perspektivo de la

redaktoro, do kun bedaŭro kaj doloro, ja mi mem estas ĉefredaktoro kaj ofte mi devas okupiĝi pri burokrataj taskoj kaj malatenti la redaktorajn. Mi estas certa, ke nia k-do redaktoro de "Sennaciulo" estas superŝutita per administraj taskoj, kiuj neniom koncernas la specifan taskon redaktoran. Se la gazetoj de niaj LEA-oj plialtigas sian kvaliton, baldaŭ la problemo pri malabundo de ĉefartikoloj en "Sennaciulo" povus trovi adekvatan solvon. "Sennaciulo" devas signifi ion pli, multon pli, ol paĝoj kie niaj membroj debatas siajn respektivajn opiniojn!

Ene de nia pragmata tuja funkciado, ni instigas la diversajn SAT-kolektivojn, kie ankoraŭ ne ekzistas Laborista Asocio, fari ĉion eblan por fondi ĝin. En ĉiu lando kie okazas SAT-kongreso, oni ne devus malprofiti la okazon por organizi LEA-on. Kial ne komenci senprokraste pretigi tiun en Slovenio, kie okazos la venonta kongreso? Kial, samlinie, ne pensi kaj fari nian eblon por fondo de LEA-o en Rusio en 1996? Al la laboristaj gvidantoj de tiuj landoj, kaj precipe al la respektivaj Perantoj, ni sendas nian sugeston. Dezirinda estas kiel eble plej baldaŭ starigi reton de vivaj LEA-oj en ĉiuj anguloj de la tero, eĉ la plej malproksimaj.

Paralele al tiuj unuaj impulsoj, kiuj devas transformi en realon la starigon de laboristaj asocioj (kaj ni insistos pri tiu komuna celo), ni nepre devos okupiĝi pri nia idearo, nia laborista idearo: niaj sindikatoj burokratiĝis, kaj tio estis la sola signo de modernigo de niaj reprezentantoj; la laboristoj ne tro atentas pri la aktualaj problemoj de nia socio kaj uzas ankoraŭ rimedojn kaj solvojn elpensitajn en la pasinta jarcento kaj komenco de la nuna. Renovigo de niaj sociaj sistemoj estas absoluta neceso. Solidara politiko favora al la plej malfortaj homoj urĝas. Alia grava problemo koncernas tiujn el niaj kompanoj, kiuj sin lasas treni de regresemaj naciismaj ideoj. Ni ne povas toleri la progreson de perfortaj sistemoj, kiuj ĉe la sojlo de la 21a jc. revas ankoraŭ pri starigo de limoj kaj aliaj baroj inter la homoj. Mi konkrete aludas la naciismon kaj la naciistojn: La naciismoj estas ĝisfunde perversaj kaj nur detruon kaj morton prezentas kiel novaĵon. Kiel en tiu ĉi momento en Centra Eŭropo kie ili aperis sub civilizita masko, aŭ tiu pli primitiva en Burundi. Kaj en aliaj lokoj de nia planedo...

Ni ne rezignacias al pasiveco antaŭ la problemoj de la laboristaro nek antaŭ la violento de la regresemaj naciismoj.

Antonio Marco Botella

## KAŬZOJ DE LA HISPANA INTERCIVITANA MILITO

En la riĉa bibliografio kaj dokumentaro pri la hispana intercivitana milito, ekzistas atentinda parto de dokumentoj verkitaj tuj post la fino de la konflikto, kiuj okupiĝis pri la kaŭzoj de tiu interfrata milito, kies rezulto preterpasas la teruran ciferon de pli ol unu miliono da mortintoj, krom perdoj de homaj rajtoj kaj agresoj gravaj kontraŭ la kulturo kaj civilizacio.

Inter la plej elstaraj homoj verkintaj pri tiu interesa socia temo estas Don Manuel Azaña y Diaz, hispana advokato, politikisto, lasta Prezidento de la Dua Hispana Respubliko kaj unu el la plej gravaj intelektuloj de sia epoko.

Don Manuel Azaña estis la plej fidela reprezentanto de tiu respublikana reĝimo naskiĝinta la 14an de aprilo 1931. Liberala politikulo, li aspiris starigi en nia lando liberalan burĝan revolucian programon similan al tiu reganta en Francio laŭlonge de la 19-a jarcento, kaj konkrete tre similan al tiu de la Tria Franca Respubliko. Kiel politikulo, li apartenis al la revolucia komitato aktivinta kontraŭ la monarkio en 1930, partoprenis en la provizora registaro kiel ministro tuj post la triumfo de la Respubliko (1931), refondis sian partion per maldekstraj elementoj kaj montriĝis ĉiam kiel unu el la plej brilaj oratoroj en la Parlamento. Fine, li atingis la plej altan ŝtatan postenon: Prezidento de la Respubliko.

Don Manuel ekziliĝis en Francio post la malvenko de la respublikanaj trupoj en la t.n. "Ebro-batalo", kaj demisiis kiel Prezidento tuj post la honta agnosko de la Franco-reĝimo fare de Francio kaj Anglio, kiuj fakte tiel legitimis ribelon de generaloj kontraŭ reĝimo leĝe balotita de la hispana popolo.

Jam de la komenciĝo de sia ekzilo, Azaña verkis serion da sociaj kaj politikaj artikoloj pri Hispanio kaj la intercivitana milito, kaj unu el ili, kiun sufiĉe grava, kiun ni nun komentas, analizis la kaŭzojn de la hispana milito.

Laŭ li, du gravaj kaŭzoj ekzistis por okazigi la hispanan militon: unu de interna karaktero kun profundaj radikoj en la strukturoj politikaj kaj sociaj de nia lando; kaj alia kun specifa karaktero eksterlanda.

Sub ambaŭ vidpunktoj, li donis jenajn eksplikojn kiel kaŭzojn de la

hispana milito:

a) La malekvilibro inter hispanaj regionoj, inter la grandaj urboj, vilaĝoj kaj kamparo. Ekzistas gravaj kontraúdiroj en la hispana socio, kies violentaj kontrastoj tute ne ebligas harmonian regadon kaj administradon. Ekzemple, dum certaj grandaj urboj ĝuas altan vivnivelon, similan al tiu de plej komfortaj kaj riĉaj landoj, en aliaj lokoj, ne malproksime de tiuj urboj, eble nur kelkajn kilometrojn, vilaĝanoj kaj modestaj kamparanoj vivas en terura mizero, sub kondiĉoj similaj al tiuj de la 15a jc.

Tiu malkvilibro ampleksis ne nur la materialan aspekton sed ankaú la kulturan kaj religian. Ekz. laú religia vidpunkto, ekzistas atentinda amaso da agnostikuloj kaj samtempe ankaú konstateblas elmontroj de superstiĉo kaj religia fanatikismo.

Alia grava malekvilibro observeblas en la neracia distribuo de riĉaĵoj: ĉe la nordokcidentaj provincoj ekzistas grava dispecigo de laborgrundo, laú tiom malgrandaj parceloj, ke ties produkto tute ne sufiĉas por nutri eĉ mem unusolan familion. Tute kontraúe sed same nekonvene okazas ĉe la sudo kaj sudokcidento de Hispanio, kie tutpotencaj bienuloj mastras la produktivan grundon po parceloj ne malpli grandaj ol 14.000 hektaroj, kio fakte signifas la absolutan regadon de kompletaj vilaĝoj sub la premo de unu sola mano.

b) Malprogreso en la popola instruadonesufiĉa industria malvolvo, malmoderniĝo de la banko kaj financorimedoj.

c) Divido de la meza klaso inter ŝtatlaikismo kaj la petoj de proletaro klamanta revolucion. Tiusence, la meza hispana klaso agis simile kiel tiu en Eùropo, kiu antaù la timo al socia revolucio apogis la faŝismon kiel rimedon por iom bremsi la socian revolucion.

d) La ekonomia krizo de la jaro 1929, kiu okazigis malaltiĝon de eksportado kaj, tial, plialtiĝon de senlaboreco. Azaña, en tiu ĉi punkto estas sufiĉe eksplikodona: «paraliziĝo de la negocoj, doganobaroj, komercoreduktiĝo, fermo de minoentreprenoj, paraliziĝo de la konstruado, deficito konstanta de la fervojo pro la rivaleco de la aútomobilo, resume, regreso de la nacia ekonomio al katastrofa punkto nefacile solvebla».



e) Firma bremsado de enmigradopolitiko fare de iberoamerikaj landoj, kiu malebligis la elmigradon al Sud-Ameriko de 100.000 hispanaj laboristoj ĉiujare.

f) Proletara opozicio al la reformoj proponitaj de la respublikana reĝimo, kiuj, akcepteblaj por la burĝaj respublikanoj, tute ne interesis la proletaron.

g) Senstabiliĝo de la publika ordo.

h) La eksterlanda helpo estis definitiva por decidigi la intercivitanan militon. Dum Italio kaj Germanio malavare helpis diplomate kaj per armiloj la ribelintojn, Francio kaj Anglio trompis ĉiujn esperojn de la demokratoj, kaj montriĝis sufiĉe perfidaj al la legitimeco kaj demokrataj principoj. La genufleksa politiko de francoj kaj angloj antaŭ la perforto nur ilian propran sklavigon meritis.

i) Al tiuj kaŭzoj, Azaña aldonas unu plian sufiĉe gravan, la hispana temperamento: ekzistas multaj hispanoj, kiuj konceptas la nacian politikon nur en unusola direkto, t.e. la propraj principoj politikaj kaj religiaj. Tiuj, kiuj ne same kiel ili pensas, ne estas bonaj patriotoj, ne estas bonaj hispanoj. Tia maltoleremo nur kondukas al la propra detruo, kies tuja rezulto en tiu ĉi kazo estis, la intercivitana milito.

Niaopinie, Don Manuel Azaña ne tro enprofundigis en la problemon kaj prijuĝis ĝin per okuloj de komforta burĝo, ekz. li forgesis indiki kiel militokaŭzon la fiaskon de la Agrara Reformo, kies korekta prezentado kaj triumfo sendube estus evitinta grandparte tiun cititan ekonomian krizon, ja la proletaro droninta en la krizo radikaliĝis kaj prave postulis socian revolucion kiel unikan solvon al la propraj problemoj. Cetere, la burĝa reĝimo aŭspiciita de la Prezidento Azaña, ne havis la kuraĝon, nek la forton postuli de la kapitalistoj

tiun revolucian projekton aú alian kun profundaj radikoj sociaj. La rezulton de tiu kapitulaco antaú la kapitalismo oni devis pagi baldaú je tre alta prezo.

La sola konkludo esprimebla al tiu sumo de faktoroj, povas esti, ke kiam socia justo kaj homama idealo tion postulas, oni devas firme batali ĝis la fino, sen ebla hezito aú sveno.

Juan Antonio Cabezos Martínez

Bibliografio:
*"Memorias de política y de guerra" (Memoraĵoj pri politiko kaj milito), de Manuel Azaña. Eldonejo "Crítica".*

"Causas de la guerra de España" (Kaúzoj de la intercivitana milito en Hispanio), de Manuel Azaña. Eldonejo "Crítica".

"La República Española y la guerra civil" (La Hispana Respubliko kaj la intercivitana milito), de Gabriel Jakson.
1931-1939. Eldonejo Orbis. Kolekto Historio-Biblioteko.

***********

## IAM, ANTAU NELONGE, OKAZIS

La 30-an de septembro 1990, la usona televido montris kion la usonaj soldatoj faris en Panamio. Kun la ekskuzo kapti UNU homon (Noriega), ili ne hezitis murdi milojn da senkulpaj civiluloj (tio estas, urbaj loĝantoj, simplaj civitanoj; ne soldatoj aù policistoj). Laú la televidprogramo, ili ĵetis iliajn kadavrojn per buldozoj en grandajn fosojn, sen ceremonio, sen identigo. Neniu klopodo estis farita por noti iliajn nomojn, sciigi parencojn, ktp. Iu, kiu deĵoris en la flughaveno de Panamo (ĉefurbo de Panamio), kaj sukcesis eskapi el la senkompata kaj sencela amasmurdo de ne-batalantoj, rakontis jene: La malmultaj soldatoj kaj policistoj, kiuj kutime gardis la flughavenon, sciante, ke la usonanoj estis alvenintaj, forlasis la lokon. Eĉ ne unu soldato, policisto, aù armita homo restis en la flughaveno. La restantaj gelaboristoj, kontoristoj, bilet-vendistoj, ktp., kiuj kun bonveniga rideto sur la lipoj atendis la usonajn soldatojn, ne ridetis longe. La usonanoj envenis maŝinpafante en ĉiu direkto, al ĉiu vivanta estaĵo. Kompreneble, la deĵoristoj tuj klopodis fuĝi, sed la invadantoj pafadis al iliaj dorsoj dum ili forkuris...

Tiam oni montris en la T.V. la klopodojn ankoraú faratajn de la popolo identigi siajn malaperintajn familianojn. Per potencaj maŝinoj oni elfosas truojn en


la grundo kaj eltiras kaj kuŝigas en longa vico la kadavrojn jam putrajn post pli ol ses monatoj. Gepatroj serĉas perditan fil(in)on; virinoj serĉas perditajn edzojn, kaj estis tre malfacile identigi la restaĵojn. Malgraŭ la ega malbonodoro, ili serĉas kaj klopodas legi identigilojn trovitajn en poŝoj, aŭ, manke de ili, rigardas en buŝoj por rekoni dentojn, aŭ ekzamenas ringojn restantajn ĉirkaŭ fingraj ostoj. Tiuj, kiuj rekonis amatan parencon, senkonsole eksplodis en ploro. Aliaj, ne trovinte parencon en unu vico, iras al alia vico da kadavroj en alia parto de la urbo, kaj al alia, kaj al alia, dum la maŝinoj senlace elfosas tunojn da grundo miksita kun homaj korpoj.

Usono diras, ke ili mortigis 202 "malamikojn" dum la invado de Panamio. Granda mensogo, diris homo en la programo. Oni jam estas trovintaj pli ol kvarmil murditojn, kaj la serĉado daŭras, ĉar oni ĵetis ilin en kaŝitajn lokojn sen ia ajn indikilo.

Panamianoj neniam pardonos, ke iliaj amataj parencoj estis murditaj sen kialo kaj forĵetitaj kvazaŭ ratoj...

S.D.-n-ro 285.

## Bonvolu ridi... sed ne tro!



Misinterpreto
Amindumanto maljuna diras al bela fraŭlino:
-Kiom feliĉa mi povus fari vin!

Kaj la fraŭlino tuj respondis:
-Ankaŭ mi pensas kiel vi!: ĉu eble vi havas konvenan nevon por edzinigi min?

***

Alia misinterpreto
Instruisto lerniganta geografion indikas per la fingro punkton de landkarto kaj demandas al lernanto:
-Kio estas tio?
Kaj la lernanto sen dubi eĉ unu sekundon tuj respondas:

-Malpura fingro!

Ankoraŭ pri malpureco
Malpurema homo diris al siaj amikoj:
-Mi ne scias kiamaniere mi min maskos ĉi tiun karnavalon, por ke neniu povos min rekoni.



-Provu vin lavi, respondis unu el ili, kaj eĉ via patrino certe ne rekonos vin!.

***

<u>Ŝparemaj virinoj</u>

-Mia edzino estas tiel ŝparema, ke el la ŝtofo de sia vestaĵo ŝi faris al mi tri kravatojn.

-Ho! mia edzino avantaĝas la vian kaj estas konsiderinde pli ŝparema, ĉar el unu sola kravato mia ŝi faris al si tutan vestaĵon.

***

<u>Kompetenta konsilanto</u>

Bonfara homo donacas moneron al almozulo kaj kaptas la okazon por konsili al li:

Bonfaranto: -Jen cent pesetoj, sed ne elspezu ilin tuj en la unua drinkejo.

Almozulo: -Mi ja rimarkas, ke vi estas kompetenta, sinjoro, ĉar en la dua drinkejo de ĉi tiu strato oni ofertas pli bonan vinon ol en la unua...

***

<u>Frivoleco</u>

Modernisma frivola virino parolas kun siaj amikinoj pri siaj influo en la hejmo kaj subpremado al la edzo, kaj kun mokemaj vortoj ofertas al unu el ili:

-Mi vendas al vi mian edzon, kiom da mono vi donas al mi?

-Neniom! respondas la alia kun sama ton.

-Nu, akceptite, la viro jam estas via!

***

<u>Scienco-malkovroj</u>

Brita sciencisto asertis, ke la televido fortimigas la ratojn. Laŭŝajne, la vibrado de la ondoj efikas sur tiujn ronĝulojn tiel, ke ili foriĝas de la televidaj aparatoj.

Kiam la ĵurnaloj aperigis la informon, leganto rapidis jene respondi:

-Tio, kio fortimigas la ratojn, ne estas la vibrado, sed... la programoj!

***

Speciala kvalito

Antaú nelonge, en amika rondeto, usona aktorino diris en Parizo:

-La viro de ĉiu lando havas, kompreneble, siajn specialajn kvalitojn kaj ĉarmojn. Ekzemple, la angloj, humuron; la francoj, afablecon; la hispanoj, galantecon; la italoj, pasian karakteron...

-Tamen mi edziniĝos kun usonano, ĉar usona edzo scipovas lavi la telerojn.

***

Ruza kuracisto

Kuracisto estis urĝe vokita al paciento, kiu ege suferis pro forta fiŝosto enpikiĝinta ĉe la gorĝo. La kuracisto tre lerte kaj rapide sukcesis forigi la pikilon. Post tiel feliĉa operacio, la kliento demandis:

-Kiom mi devas pagi?

Al kio la kuracisto tuj respondis:

-La duonon de tiu sumo, kiun tre volonte vi estus paginta, kiam la fiŝosto ankoraú ŝiris vian gorĝon.

***

Leciono pri botaniko

En leciono pri Botaniko, instruisto demandas al distriĝema lernanto:

-Kiu estas tiu ĉi herbo?
-Mi ne scias.

-Ĉu vere? Ĉu efektive vi ne konas la medikagon? Ho! vi estas azeno.

-Tute ne, sinjoro profesoro, se mi estus azeno, tuj mi estus koninta tiun herbon.

Maria Fernanda

---

**Grava por nia Asocio**

Ni atentigas niajn gekamaradojn, kiuj ankoraù ne pagis la ĉi-jaran kotizon aù abonon, fari tion kiel eble plej baldaù al la Kasisto de HALE. Gravas tiu akurateco por nia Asocio! Dankon.

# KIO OKAZAS EN LA MONDO

Mi supozas, ke multaj trovas tre malfacila respondi tiun ci demandon. Antaŭe, oni provis konvinki nin ke ĉion malbonan en la mondo kaŭzis la malbenitaj komunistoj. Hodiaŭ, kiam jam praktike ne estas komunistoj en la mondo, escepte de kelkaj lastaj mohikanoj sentantaj ke neniam la utopioj estis pli necesaj ol nun, oni trovas eks-komunistojn (ĉefe se ili estas burĝdevenaj) interesiĝantaj pri orienta mistikismo aŭ pri la ebloj (malmultaj) de persona sukceso en la novliberalaj socioj, sed la malbono persistas en la mondo, tiel intense kiel ĉiam... aŭ pli! Nu, oni vidas nun ke la malbono ne estis la komunistoj! Kaj la disvolviĝo de la historio montris al ni, ke la vera "regno de la malbono" (fama Reagan-a frazo) estas fakte Usono! Ĉu ne? Tamen, oni vidas ke la arto esti perversa iĝis pli subtila, pli postulema, kaj oni devas observi pli akre por atenti... kaj antaŭeviti la aferon.

La lastajn semajnojn, ekzemple, multaj personoj ne atentis pri serio da noticoj kaŝantaj unu el la plej perfidaj dramoj de la XX-a jarcento: la eventojn en Irako. Eĉ Romo ne altrudis al Kartago tiom severajn mezurojn kiel tiuj altruditaj de Usono (kun la nekredebla aprobo de la UNO!) al Irako, eĉ pli ferocaj ol tiuj altruditaj al Kubo. La preteksto, kiel ĉiam, estas la defendo de la demokratio. Sed oni devas eviti iluziojn. Ŝajnas, fakte, ke Sadam Husein estas diktatoro. Sed almenaŭ li estas diktatoro kiu portis sian landon en la vojon de la moderneco, de la okcidenta civilizacio (kiu, malgraŭ ĉio, ankoraŭ estas la plej liberiganta). Sed la alianculoj de Usono, la emiroj de la Golfo, Kŭajt, Saudi-Arabio, ktp. estas diktaturoj ankoraŭ pli ferocaj, kun la malavantaĝo ke ili estas reakciaj kaj mezepokaj. Usono eĉ subtenis la ŝijaistojn de suda Irako por kaŭzi problemojn al Sadam, kvankam ŝijaistoj estas kruelegaj malamikoj de la okcidenta civilizacio kaj de la moderna mondo, de Usono mem.

Kompreneble, mi supozas ke neniu sin lasas trompi pri la reala motivo de la nafta embargo al Irako. Kompreneble, se Irako eksportus sian nafton libere (lastatempe oni permesis la eksportadon de nur tre limigita kvoto), Sadam Husein ne nur povus daŭrigi sian taskon kreskigi la landon sed tio povus malaltigi la mondan prezon de la nafto, kio ne plaĉus al multaj personoj, inkluzive de Usono, unu el la ĉefaj produktantoj.

Do, pro pure profitavidaj motivoj, oni metas Irakon en situacion komplete neakcepteblan, sen mono por aĉeti manĝaĵojn, medikamentojn, maŝinojn... la bonfarojn de la moderna mondo. La porciolimigo malpliigis la nutradan nivelon de la loĝantaro al la minimumo tolerebla, personoj mortas en la hospitaloj pro manko de medikamentoj, la infana mortokvanto (antaŭe la plej malalta en la Meza Oriento) denove ascendis al koloniaj niveloj.



Kaj tamen, oni ne multe parolis pri tiu ĉi afero. La gazetaro mutis. Ja la irakanoj estas tre malproksime. Sed novaĵo aperinta antaŭ ne multaj tagoj teruriĝis min. Ĝi diris ke 29.000 usonaj soldatoj kiuj estis en la Golfa milito suferas komplekson da malsanoj kiu jam nomiĝas "sindromo de la Golfa Milito", tre kontaĝeman. Ne nur la soldatoj sed ankaŭ iliaj edzinoj suferas akutan lacecon, naŭzosenton, dolorojn en la ekstremaĵoj, digestajn malfacilaĵojn, vomojn kaj... ginekologiajn problemojn en la edzinoj de l' soldatoj, ĝis abortiĝo kaj infanoj naskitaj kun malsanoj kaj neperfektaĵoj. Laŭ esploro organizita de la senatano Donald Riegle (usona, eh!), estas afekciitaj 78% de la edzinoj de soldatoj, 25% de la jam naskiĝintaj post la reveno de la milito. La kontaĝitaj manifestacioj, krom la analizoj de la gasmaskoj kaj aliaj elementoj, devigis senatananon Riegle suspekti ke "en la sceno de la konflikto estis ĥemiaj armiloj kaj biologiaj agentoj".

Se tio veras, ŝajnas ke ne estas dubo pri kiu uzis la ĥemiajn armilojn kaj la biologiajn agentojn. Se la malnoblulo estus Irako, la novaĵo ne aperus apartigita, kvazaŭ honte, en la internaj paĝoj de la ĵurnaloj, kaj senatano Riegle ne bezonus esplori la aferon: ĝi venus sur la frontpaĝoj kun ĉiuj detaloj por ke la mondo povus malami la monstron kiu nomiĝas Sadam Husein.

Sed kio devas ĉefe alarmi nin estas tio, kio okazas precize en Irako. Se la gasoj afekciis usonajn soldatojn "resalte", kio okazis al la soldatoj kaj la civila loĝantaro de Irako? Oni scias nenion. Ĉar, malgraŭ la granda "televida spektaklo" organizita de Usono, ni konas pli pri la kartagaj militoj aŭ pri la Centjara Milito ol pri la agreso de Okcidento kontraŭ Irako.

Manuel de SEABRA

# LA MOVADO EN KAJ EKSTER IBERIO

Parizo.

Kiel anoncite, la 68a SAT-kongreso okazos en Maribor, Slovenio, de la 15a ĝis la 22a de julio 1995. En la SAT-sidejo en Parizo oni organizas aviadilan vojaĝon al la kongreso, de la franca ĉefurbo al Ljubljana pere de la flugkompanio "Air France", laŭ jena projekto:

Flugo AF 2792 ĉu dimanĉe 9/7/95, ĉu 14/7/95, Orly Sud 12,25 h./ Ljubljana 14 h.
Reveno: 23/7/95, Ljubljana 14,40 h./ Parizo-Orly Sud 16,25 h.

Prezo 1900 FF proks. al kio oni devas aldoni la koston de la vojaĝo ĝis / al Maribor.

Por certeco partopreni tiun vojaĝon bonvolu sendi antaŭpagon da 1.000 FF precizigante la daton de via foriro.

Aldonaj informoj ĉe la SAT-sidejo.

---

Zaragozo. "Biblioteko D-ro Olavide"



La veterana esperantista societo "Frateco" de la aragona ĉefurbo, fondita en 1908 kaj funkcianta seninterrompe de tiu fondojaro ĝis hodiaŭ, krom dum la hispana intercivitana milito, posedos de la fino de majo 1995 unu el la esperantistaj bibliotekoj plej kompletaj de Hispanio, post la decido de familio Olavide donaci sia privatan bibliotekon al nia E-rondo.

D-ro José OLAVIDE, psikiatro, forpasinta en 1992, tre kompetenta esperantisto, estis vera sciado-arkivo pri Esperanta Literaturo kaj havis senliman amon por la libroj, kiujn li aĉetis per akuta fajna sentiveco. Li posedis, do, la plej kompletan privatan esperantistan bibliotekon de nia lando.

La biblioteko de "Frateco" de Zaragozo, jam sufiĉe ampleksa post la librodonacoj de familioj Manuel kaj Eúsebio Maynar, Gastón, k.a. akiras nun altan rangon post tiu de familio Olavide, plej alta kontribuo el tiuj libro-donacoj.

Kiel dankon al tiu grava malavara donaco kaj honore al la esperantisteco de la dokta forpasinto, la biblioteko de la centro "Frateco" de Zaragozo, post decido de sia estraro, alprenis la nomon "Biblioteko D-ro José OLAVIDE"

---

Barcelono.

La 23an de aprilo okazas en Katalunio unu el la plej gravaj kulturaj festoj: tradicie la virinoj donacas librojn al la viroj, kaj la viroj rozojn al la virinoj. Ankaù la Esperantaj Asocioj de Barcelono partoprenas en tiuj festoj kaj ĉi-jare starigis standon kun Esperanto-eldonaĵoj: libroj, revuoj, afiŝoj kaj informfolioj pri nia movado.

Ankaú en Barcelono, konkrete la 7an de aprilo kaj organizita de SIETI, okazis en la Aùtonoma Universitato de Bellaterra simpozio pri "Nefortaj lingvoj en Eùropo": babla, kataluna, irlanda, rumana k.a. Partoprenis 8 prelegantoj, inter kiuj nia samideano Giordano Moya en la nomo de Esperanto-lingvo, en kiu li sugestis, ke registaroj kaj parolantoj de tiuj minoritataj lingvoj, kiel protekto kaj defendo de siaj respektivaj lingvoj devus subteni la uzadon en internaciaj kongresoj de neùtrala lingvo, t.e. Esperanto, kun la celo, ke iom post iom tiuj 7/8 "fortaj" lingvoj perdu sian hegemonion en la grandaj internaciaj kunvenoj. Pli ol cent gestudentoj partoprenis en la simpozio kaj alta nombro el ili ankaù en la debatoj.

---

**Deziras korespondadi**

Miaj gefiloj, Marijana 18-jara kaj Ylijan 17-jara, dez. kor. kun hispabaj gejunuloj pri ĉiuj temoj.

Adreso: Doĉka Dolapĉieva; bul. Nikola Petkov, 13, pk. 48. BG-6000 KAZANLAK. Bulgario.

Belaj fraúlinoj Alina, Olga, Elvira, Ira, Orsana, Julia, Tania, lernantinoj de 2/3/4/5/6 klasoj el meza lernejo dez. kor. kun hispanoj per esperanta aù hispana lingvo pri: ĉiutaga vivo, lernado, amuzado, muziko, sporto, vojaĝoj ktp. Bonv. skribi al jena adreso: Interklubo "Esperanto"-Junulara Grupo. Nijnevartovsk, 6. 626440-Siberio Rusio-Poccna. RUSIA.

*******

# GARCIA LORCA KAJ LIA DOMO ĈE LA BEDARO

Antaŭ kelkaj tagoj oni inaŭguris la domo-muzeon García Lorca. En tiu domo naskiĝis kelkaj el liaj plej reprezentaj verkoj, nome, "La cigana romancaro" aŭ "Sanga nupto" (ambaŭ tradukitaj al Esperanto). De tie li eliris por ne plu reveni ĝis kiam oni trovis lin murdita sur la fata intermonta loko nomata Viznar, dum la unuaj tragikaj tagoj de la intercivitana hispana milito en 1936.

Du monatoj pli frue ol kalkulite, la domo de Federico García Lorca ĉe la bedo de San Vicente, la granada bedaro kie la poeto kutimis libertempi dum somero, transformiĝis en novan muzeon elvokantan lian vivon kaj verkaron.

Leteroj, libroj, desegnoj, manuskriptoj kun liaj poemoj, privataj objektoj kaj aliaj memoraĵoj montriĝas en tiu ĉi nova Lorca-muzeo, kiu celas, kune kun tiu de Fuente Vaqueros, omaĝi la figuron kaj memoron de tiu neripetebla artisto, kaj integri lin per lia ĉeesto nevidebla, ankoraŭ pli ol ĝis nun, en la belan Granadon de liaj revoj.

La domo-muzeo de García Lorca iĝas de tiu ĉi momento deviga loko por pilgrimado de artistoj, idealistoj kaj simplaj homoj amantaj la lirikon kaj la progresemajn sociajn ideojn.

La domo-muzeo ne nur elvokas la figuron de granda poeto, sed ankaŭ atentigas nin, ke kune kun belo, bono, vero kaj homoj sindonemaj, ankaŭ ekzistas inter ni homoj perversaj kapablaj murdi poeton kaj atenci kontraŭ la ideoj plej puraj. Kiel siatempe kantis Francisco Salinas:

"Nur ĉar ĝi mirinde kantis
oni murdis la najtingalon.

Florplenas la blankaj karmenoj,(*)
ploras Granada senkonsole,
pugnoj vibrantaj kun kolero
postulas punvenĝon furore.

Venas el vilaĝa turo
funebra plor' de sonoriloj,
larmas silenttrista la luno
post la morto de Federico.

Eksonas gitaro preĝanta
el araba-kaprica fenestro...
La revaj kortoj de Alhambra
vibras en doloro kaj plendoj, ktp.



Kamarado vizitonto: iam, kiam vi venos al tiu ĉi domo-muzeo de García Lorca, memoru ĉiam, ke ĝi estis la hejmo de idealisma homo amanta la belecon, sub kies etoso li kreis mirindan lirikan mondon. El ĝi, perforte, li eliris kaj trovis la morton fare de homoj, kiuj volis mortigi kun li la ideojn. Sed ili ne atingis la celon, tute kontraŭe ili nur akcelis la triumfon de la homa spirito kaj la universalecon de la granda poeto.

A.M.B.

(*) Karmeno: populara nomo de vilao en Granado.

---

## GRAVA ALVOKO AL NIAJ VETERANOJ

La Hispana Asocio de Laboristoj Esperantistaj (HALE) informas niajn gekamaradojn, ke ĉe iniciato de pluraj SAT-membroj sub la devizo "Nia propra historio estu nia memoro", nia k-do Antonio Marco Botella, kun la valora kontribuo de kelkaj veteranoj kaj eĉ kun la ne tiom veterana kiel tiu de nia k-do Miguel Fernández Martín, verkis historion pri la LABORISTA HISPANA E-MOVADO. La celo de tiu ĉi ALVOKO estas antaŭ ol la libro estu eldonita, t.e., dum la mallonga periodo de korektoj, aldonoj aŭ forigoj, inviti niajn esperantistajn veteranojn, kiuj vivis, suferis kaj strebis por laboristaj esperantistaj celoj, (en karceroj, milito, koncentrejoj laboristaj asocioj ktp.) skribi al nia k-do Marco pri la propraj spertoj. Bonvenaj estos ankaŭ sugestoj de aliaj esperantistoj. Gravas, ke ili informu nian k-don pri tiuj viveroj, eĉ se la forpaso de la tempo duonsvenigis tiujn impresojn...

La temoj ĝis nun jam pritraktitaj sed modifeblaj per novaj alportoj jenas:

## TEMARO

Antaŭparolo.

**<u>Kronikoj pri Laborista E-Movado en Hispanio</u>:**

Naskiĝo de la Movado.
La hispanaj laboristoj antaŭ la UK en Barcelono.
La Laborista Movado post la UK.
Efikoj de la unua mondmilito.
Revivigo de la E-Movado. Elstaras Vaskolando.
Grava decido pri Esperanto fare de sindikatoj.
Rigardo al eksterlando. Fondiĝo de SAT.
Esperantistoj politike diverspensantaj.
IPE naskiĝas en Berlino.
Denove pri nia specifa Hispana Laborista E-Movado.
Progresas la Movado en Hispanio.
Potenca progreso de laborista kataluna esperantismo.
Esperanto en la Nacia kongreso de la Socialista Partio.
La Laborista E-Movado en Madrido.
Ribelo de respublikanoj en Jaca.
Triumfo de la Respubliko en Hispanio.
Fondo de E-Grupo kun karakterizo solidara.
La Laborista E-Movado ĉe Kanariaj Insuloj.
La 14-a SAT-kongreso en Valencio.
Marksisma politika partio tre esperantema.
Fondo de la polemika POUM. Andreo NIN.
Ankoraŭ je la mano de Juan Régulo.
La hispana intercivitana milito.
La Laborista E-Movado dum la hispana milito.
Originala ne-ŝtata nek privata produktadorganizo.
Laboristaj E-revuoj:"Popola Fronto","Informa Bulteno".
La Komitato por Ne-Interveno en unu sola direkto.
La defendo de Madrido.
La ofensivo de italaj faŝistoj.
Gernika sub sovaĝa nazia bombardado.
Riproĉoj al indiferento de Eŭropaj antifaŝistoj.
Kvereloj en la antifaŝista familio.
Sekvoj de la maja ribelo en Barcelono.
La deklivo malfavora al la Respublikbatalantoj.
Esperantisma etoso en laboristaj vicoj.
Unuiĝo de esperantistaj neŭtraluloj en Barcelono.
La Internaciaj Brigadoj en la demokrata Hispanio.
Terura militofino.
Ekziliĝo de la hispanaj demokratoj.


Miaj konversacioj kun generalo Mangada.
Punkoncentrejoj en Alĝerio.
Liberigo de ekzilitoj el nord-afrikaj koncentrejoj.
La longa, longega postmilita periodo en Hispanio.
Fino de la Dua mondmilito. Apero de «Senŝtatano«.
Hispanoj ĉe naziaj ekstermejoj.
Sur la hispana tero.
K-do Luis Hernández: lirika talento, fidela homo.
La fondo de LEA-o en Hispanio.
SAT-Antaŭkongreso en Ordesa.
La 59-a SAT-kongreso en Sant Cugat.
Fondo de HALE. Problemoj, problemoj...

KVIZO

# ENIGMOLUDO PRI BELETRAJ BESTOJ

Nomoj de bestoj troviĝas en la titoloj de kelkaj originalaj kaj tradukitaj verkoj en Esperanto. Sekvas mallongaj priskriboj de la enhavo de dek tiaj libroj. Ĉu vi povas diveni la koncernajn bestojn kaj diri la titolon de la verko kaj la nomon de la aŭtoro?

1. Malgraŭ la nomo de iama fama Pariza esperantista kabaredo, oni ne aŭdis miaŭadon sed humurajn poezion kaj kantojn. Tiu heredaĵo estas konservita en la libro.



2. Tradukita romano de hungara aŭtoro temas pri psikologiaj problemoj de junulo suferanta pro skizofrenio. En la titolo estas la nomo de longkrura birdo, kiu ofte nestas sur tegmentoj.

3. La titolo de kolektaĵo da dek tri originalaj noveloj verkitaj de hungaro, kiu elmigris al Svedio, estas anoncita fare de kokerikado de galina kortbirdo.

4. Senvestita homo estas ĉirkaŭita de ululantaj sovaĝaj rabobestoj en tradukaĵo de germana aŭtobiografia romano pri la fifama nazia koncentrejo Buchenwald.

5. Longvosta birdo el la ordo de paseroformaj birdoj aŭdis fabelojn de sia patrino kaj prezentis ilin en la libro. Ĝiaj spritaj, fantaziaj rakontoj havas Esperantajn temojn.

6. Kornhava besto portanta la latinan taksonomian nomon Rangifer tarandus, *kontribuas sian lapondevenan nomon al originala novel-kolekto pritraktanta la vivon kaj landon de la popolo loĝanta en la nordo de Finnlando.*

7. La nomo de felisa kvarpiedulo troviĝas en la titolo de libro kun dek kvar mallongaj noveloj de estona verkistino.

8. Rabobesto el la familio de musteledoj donas sian nomon al la titolo de dramo en la serba lingvo pri Bosnio sub aŭstria regado en la 19-a jc.

9. Enhavas la nomon de dekpieda krustulo la titolo de bildstria aventur-libro pri la entreprenema raportisto Tinĉjo, kiu kun la kapitano Hadoko kaj la hundo Miluo ĉasas drogistojn.

10. Fiŝnomo formas parton de la titolo de krimromano pri mezaĝa viro, kiu malkovras sekretojn de eventoj dum la dua mondmilito en franca vilaĝo.

Bernard GOLDEN

---

## BOJKOTO KONTRAŬ LA NAZIA PROPAGANDO!

Jen listo de naziaj rokbandoj. Ilia muziko estas diversstila (punko, ojo, metalroko) kaj eĉ povas plaĉi al vi, sed ili nur estas fiaj faŝistaj grupoj, kiuj nur meritas vian malamon. Traduku kaj publikigu tiun ĉi liston en via pralingvo por bojkoti kaj detrui propagandilon de aŭtentaj malamikoj de la popolo:

Agent Buldog (Usono) Kroiz Froten (Germanio)

Agnostic Front Usono)
American Eagle (Usono)
At War (Svedio)
Battle Zone (Britio)
B.Justice (Kimrio)
Blood and Honour (Francio)
Body Checks (Germanio)
Bohse Onkels (Germanio)
Boots Brothers (Germanio)
Bound for Glory (Usono)
Brutal Attack (Britio)
Brutal Combat (Usono)
Brutal Verschimmelt (Germ.)
Bunker 84 (Francio)
Burzum (Norvegio)
Celtic Dawn (Francio)
Chauves Pourris (Francio)
Combat 84 (Britio)
Combat Rune (Katalunio)
Condemned 84 (Britio)
Control Natal (Kolombio)
Cotzbrocken (Germanio)
Cro.Mags (Usono)
Crumsuckers (Usono)
Cynic Klan (Katalunio)
Der Fluch (Germanio)
Die Allierten (Germanio)
Dirlewanger (Svedio)
Division 250 (Katalunio)
Division 5 (Svedio)
El Klan (Katalunio)
Endstufe (Germanio)
English Rose (Britio)
Estirpe Imperial (Hispanio)
Evil Skins (Usono)
Ex-Cess (Jugoslavio)
Fasaga (Germanio)
Fig Action (?)
Final Solution (Usono)
Foierstoss (Germanio)
Force de Frapp (Francio)

Legion 88 (Francio)
M.A.F. (Germanio)
M.O.T.U. (Suomio)
Mr. Joint (Jugoslavio)
Nabat (Italio)
Nordic Thunder (Usono)
Nordlan (?)
No Remorse (Britio)
No Surrender (Britio)
Oberste Heeresleitung (Germ.)
Oiffensive (Francio)
Pantera (Usono)
Paul Burley and the Four Reich (Britio)
Peggior Amico (Italio)
Radikhal (Germanio)
Ritam Nereda (?)
Ruhrptt Rejects (Germanio)
Sacrilegeous (Suomio)
Section 5 (?)
Sieg (Germanio)
Skins Korps (?)
Skrewdriver (Britio)
Skullhead (Usono)
Snix (Francio)
Sociedad Violenta (Kolombio)
Stab (Italio)
Strawdogs (Britio-Usono)
Stormtropers of Dead (Usono)
Stormwatch (Usono)
Storkraft (Germanio)
Stosstrup (Germanio)
Sudden Impact (Usono)
Squadron (?)
Swastika (Svedio)
Tension Fiends (Germanio)
The Allegiance (Britio)
The Exploited (Britio)
Tonstorung (Germanio)
Trietbtaber (Germanio)
Type O Negative (Usono) k.t.p.

N.G.G.

# ORIGINALA POEZIO

## RIVERO

*Yo y mi sombra, ángulo recto.*
*Yo y mi sombra, libro abierto.*

Manuel Altolaguirre

Tremol-frondoj estas eĥoj
— fiksaj, daŭraj kaj arĝentaj —
de l' riveraj frosto-tremoj.

Mi, kun la gitaro kune.
Mi, kun la gitar', sublune.

Junkas knab' aŭ akva siblo.
Preter li sin pelas svarmoj
da travidaj tempo-fiŝoj.

Mi, kun la gitaro kune.
Mi, kun la gitar', sublune.



Kaj pretere somnambulo
ade faras ĥimer-digojn,
frakasatajn de la fluo.

Mi, kun la gitaro kune.
Mi, kun la gitar', sublune.

Miamorte la gitaron
tuj sepultu river-kirle,
ke ĝin ludu plu la ŝaŭmo.

Mi, kun la gitaro kune.
Mi, kun la gitar', sublune.

Miguel Fernández

*Kajeroj*
*— el la Sudo*

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Str, Av. Compromiso de Caspe, 27/29. 9°.
50002 - Zaragoza (Hispanio)

Depósito Legal: Z-2398-88
Presejo: Eurocopia, S.L.